



# ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9. — Redaktas dr. Stan. Kamarýt.

## Esperanto ve školách

V tomto čísle přinášíme zprávy o tom, že i na českých odborných školách bude lze vyučovati esperantu jako nepovinnému předmětu, a že ministerstvo a zemské školní rady dávají sporadicky povolení vyučovati mu tak i na gymnasiích a na školách měšťanských. Vrací se tak esperanto do posic, jež mělo na československých školách asi v letech 1924—1930. Zase bude možno několika stovkám studentů dáti možnost nejen aby se naučili esperantu, ale i aby navázali skutečné písemné a někdy i osobní styky se studenty jiných národů, a to styky daleko reálnější než studiem cizích jazyků, jimž se učí povinně.

Naši spolupracovníci jsou tu znovu stavění před úkol velmi závažný. Prosíme samideány profesory a učitele, aby na školách, kde vyučují nebo s kterými mají styk, vyučování esperantu jako nepovinnému předmětu ředitelství navrhli a pečovali, aby ředitelství odeslala příslušná podání nadřízeným instancím. Vykonají tím velmi užitečný čin pro svou školu a pro své žáky. Už nyní mějte za to náš dík.

Nesmíme si však tajiti, že toto vyučování nebude mít význam propagační. Nemůže ho mít a ani ho mít nemá. V ohledu propagačním působí spíše záporně. Neboť mnozí žáci zase esperanto zapomenou a za několik let mladí muži budou vypravovati, že se také učili esperantu, ale že už je zapomněli. Nesmíme si to tajiti.

Neboť zase to bude vyučování sporadické. Také v jiných zemích se učí esperantu sporadicky ve školách náhodně vybraných a bez vzájemné časové souvislosti. To je asi hlavní příčina, proč výsledky vyučování esperantu na školách jsou dost pomíjivé, jak vůči nám často zdůrazňují odpůrci tohoto vyučování.

Odpomoci tomu může jen současnost vyučování v různých státech. Té lze docílití mezinárodní smlouvou a o tu se esperantisté pokoušejí. První pokusy se daly v letech okolo 1930 u Společnosti národů. Náčrtek smlouvy byl tehdy předložen právníkům společnosti k předběžnému posudku. Nyní byl tento pokus obnoven. Naše školská komise (její ředitel p. profesor Th. Kilian) vede celou věc v patrnosti. Z několika států jsou nadějně přísliby, ale nepodařilo se dosud nikde dostati slib, že dotyčná vláda vystoupí iniciativně. My si myslíme, že by si tuto zásluhu

měla a mohla získati vláda československá. Naše školská komise učinila v tom směru řadu podání, zákroků a rozhovorů. Jedná se o věc novou. Proto výsledek nelze zaručiti. Ale i sám pokus je záslužný.

Avšak ani když se mezinárodní konvence o současném pokusném povinném vyučování esperantu v několika státech neuskuteční v brzké době, učení se esperantu i jen jako nepovinnému předmětu znamená pro žáky, jimž se ho dostane, hodnotu velmi pozitivní. Předně naučí se jím opravdu mluvití, a to, docílí-li učitel, aby se opravdu učili, za rok. To nelze říci o povinné angličtině nebo francouzštině ani po maturitě. Za druhé znamená hodina esperanta druh praktika v logickém myšlení, a to daleko intensivnější než latina, jejíž místo v učebních osnovách se odůvodňuje často také tímto zřetelem. Tuto funkci vyučování esperantu pokládáme zatím za nejvýznačnější, a nyní, když ze školy druhého stupně latina vymizí, nerozpakovali bychom se právě z tohoto hlediska navrhovati, aby se tam esperantu učilo po dvou hodinách v 3. a 4. třídě povinně. Je to nejúčinnější prostředek k cílům, jež se označují zkratkou formálního vzdělání.

Proto jsme velmi vděčni školské správě, že několika posledními výnosy umožnila vyučování esperantu na československých školách, a pozdravujeme při té příležitosti zvlášť srdečně a uctivě pana ministra školství Zdeňka Nejedlého. Naši učitelé se vynasnaží, aby učili esperantu dobře a aby i vyučování esperantu odpovídalo lidově demokratickým ideálům našeho školství.

Dr Stan. Kamarýt.

## MATENE

*Antaŭ mi sur la ponto  
al la lerneĵ' vi iras;  
vi molas kiel ondo,  
vi freŝe, june spiras.*

*Kaj viaj longaj kruroj  
min nedireble tentas...  
Sed viaj du okuloj  
hezitas kaj — silentas...*

*Tamen vi rerigardas  
strange, strangege, jongle;  
kaj io en vi ardas*

*kvazaŭ vi volus mute  
diri: „Mi jam tre longe  
vin umas absolute!“*

Karolo Piĉ.

## T. Pump: Rememoro pri Karel Hynek Mácha

En la numero 4 de la pasinta jarkolekto de nia revuo ni publikis artikoleon pri la ĉeĥa poeto Karel Hynek Mácha (1810—1836) kaj presis la unuan kanton de lia romantika poemo Majo, kiu tiom influis la evoluon de la ĉeĥa arto en la sekvintaj jardekoj. — Fragmento el la dua kanto (karcera sceno) aperis en Literatura Mondo, j. 1948, n-ro 3-4.

La poeto Mácha meritas, ke ni rememoru lin ankoraŭfoje en la monato samnoma kun lia ĉefverko. Ni faras tiel represante la trian kanton de lia poemo.

Estas necese koncize priskribi la enhavon de la versita romano:

Rabisto Vilemo, nomata „La terura suvereno de l' arbaroj“, mortigis la deloginton de sia amatino, nesciante,

ke estas lia propra patro. Li estis arestita kaj kondamnita je morto, dum la amatino dronigis sin en la lago. En la dua kanto travivas Vilemo teruran nokton, plenan de antaŭmortaj halucinoj, konsciigante al si la neeviteblan finon de sia vivo kaj foriron el la bela mondo.

La tria kanto, kiun vi nun legos, enkondukas nin en florantan naturon dum pompa maja mateno. Kaj meze de tiu belo estas Vilemo ekzekutita: Oni lin senkapigas kaj lian korpon plektas en radon.

La versoj, kie Vilemo pere de flugantaj nubetoj adiaŭas al la Tero-Patrino, kaj poste la finaj metaforoj, per kiuj la poeto esprimas la bedaŭron pro la pasinta juneco, apartenas al la plej artaj lokoj de la poemo.

Karel Hynek Mácha:

## MAJO

(Tria kanto.)

*Super mont-ombroj maj' ektagas:*

*La valon vekas roz-maten',  
nur tra arbaroj de l' eben'  
nebulsutila sonĝo vagas.  
Lazura spir' el dens' arbara  
al roza firmament' ascendas,  
super kolora lag' opala  
bluaj vaporoj ŝvebe pendas.  
Kaj sur la bord' en ombroj montaj  
kaj en la vasta region'  
blanketas domo apud dom'  
ĝis la arbaroj horizontaj.  
Plej altas tamen en la fon'  
— kiel noktombro — mont' giganta  
en ĉielrozojn penetranta:  
majesta reĝo sur la tron'.*

*Kiam sur monto-ultramar' ekbrilis  
la ruĝa Suna stero el purpur',  
ĉio vekigis el la sonĝobskur'  
kaj ĉiu kreitaĵo ekjubilis:*

*Sur verda lagnivel' blankplumaj birdoj svarmas,  
sub rapida remad' boatoj vigle pasas  
kaj sur likva lazur' purpurajn striojn lasas ...  
Susuras pinarbar' sur vasta laga bord'  
kaj en ĝi turda hor' kaj pliaj birdoj psalmas.  
Knabinoj en la val' kunkantas en agord' ...  
Por ĉiu viva kor' junaĝa majo ĉarmas.  
Freŝa matena vent' kiel kanteto spiras,  
anseroj super arbar' velas tra venta driv';  
cedas sub ventotuŝ' arbetoj sur dekliv'  
kaj en la verda val' ĝi blankan floron ŝiras.*

*Sed unusola scen' la belon, ve! makulas:  
Mallarĝa insulet' kuŝas sur lagnivel'  
kaj sub ĝi en profund', en vasta, verda hel'  
urbet' kun blanka tur' sin akve respegulas.  
Tie la frua tag' ehas de homa kri':  
Grandega homamas' el pord' mallarĝa venas,  
venas el ĉirkaŭaj', jam vojojn ŝtopas ĝi,  
kaj venas ĉiam pli, jam ĉiuj lokoj plenas.  
Tiu sennombra amas' laŭtigas kun pliforto:  
La malfeliĉa krimul' eliri devas jam!*

*Tra la mullarĝa pordeg' venas soldatkohorto  
en malrapida mars' kaj meze de l' eskorto  
iras la arestit' kun sia fama ornam'.  
Mutigas la popol', sed reeksonas kri'  
kaj bruas la parol': „Jen! Estas, estas li!  
Jes, certe estas li! Vidu, la plumĉapel',  
sub ĝi la flama okul', la floroj, la mantel'!  
Vidu, la Suveren'! Jen la Arbar-Teruro!“  
Tiel aŭdiĝas la kri' kaj bruas la homamaso.  
Kaj pli kreskas la bru' kiel akvegurmuro,  
ju pli venas la vir' en malrapida paŝo.  
Densas la akompan' samkiel nubo nigra,  
kaj el ĝi kiel fulm' oftas armiloj brili.  
Teren rigardas la vir' dum tiu mars' malvigla.  
Eksonas sonoril' kaj homoj preĝas pri li.*

*Estas nealta montet' sur bord' de l' lag' lazura,  
sur ĝi longa palis' kun rado ekzekuta,  
iom en antaŭaj' duverta monto kruta,  
sur la pli alta vert' staras kapel' blankmura.  
Al tiu blanka kapel' la grupo malrapidis ...  
Nun ĉiuj cedas for, la viro solas jam.  
En Templon de l' Natur' oni lin laste gvidis  
por lasta pririgard' de l' monta panoram',  
kiu dum lia junec' la gajajn jarojn vidis.  
Kaj oni gvidis lin al la kapelo blanka,  
ke li je lasta foj' sub firmamento roza  
sin turnu al Sinjor' de l' Mondo grandioza  
por diri antaŭ Li preĝon de sento danka.*

*Murmuro de l' amas' mutigis por moment',  
ektremis ĉies kor' sub premo de kunsent',  
en ploro kaj malgaj' staras la ar' popola.  
Rigardas ĉiu hom' supren al montopint',  
meze de l' Natur-pomp', kie nun la krimint'  
humilas antaŭ Di' en preĝo senparola.*

*Farbis la matensuna brul'  
la palajn vangojn de l' krimul';  
malgaje li rigardas,  
sur vangoj larmoj ardas.  
Sub li, ĝis kie vid' atingas,  
malhelaj montoj valon ringas  
kaj la arbaroj ĉirkaŭgardas;*

kuŝas en dorm' la lagspegul'.  
 Ĝuste ĉe l' bordo ultramar'  
 la lagon farbas, plu perdiĝas,  
 la akvo pli kaj pli verdiĝas,  
 ĝis limas ĝin nur pala klar'.  
 En granda rond' — ĝis vidobar' —  
 surborde blankaj domoj disas;  
 blankas birdar' sur akvoglat',  
 pasas boato post boat',  
 ĝis kie akvo montojn kisas  
 en fin' de blua perspektiv'.  
 La blankaj domoj, la boato-driv',  
 la turo, urbo, blankaj birdoj,  
 malhelaj montoj, borddekliv'  
 duoblas kiel akvobildoj  
 en la spegul' de l' glato likva.  
 Fore en bluo rokmasiv'  
 florantan bordon daŭras ŝarĝi;  
 tie li vidas kverkon larĝi...  
 Ho, amo sub la arb' antikva! —  
 turta kverado logis al ĝi —  
 ĝi pasis for — for — senrelikva!

Antaŭe jen montet' najbaras,  
 sur ĝi palis' kun rado staras...  
 Sub li susuras en malgaj'  
 juna arbar' melankolia.  
 En vasta valo Sun' radia  
 kaj frua ros', matena maj'.

Kaj la krimul' ankoraŭ vide pasas  
 ĉion ĉi, kion li nun forlasas,  
 kaj ekdoloro lian koron fendas,  
 ĝis larmon sekvas larmino, ĝemon ĝem' —  
 Ankoraŭ lasta, lasta rigardem' — —  
 Nun larman vidon li ĉielen sendas:  
 Palaj vaporoj mortas en la blu',  
 zefir' facila ilin lude tiklas,  
 kaj alte, alte sur ĉielo migras  
 blankaj nubetoj, ĉiam plu kaj plu...  
 La trista arestit' al ili diras:

„Vi, kiuj fluge al senlimo iras,  
 la Teron per misteraj brakoj premas,  
 vi steloj likviĝintaj, vi ombroj de l' lazur',  
 funebraj gastoj, kiuj ploras nur  
 kaj tiel mute vin ellarmi emas...  
 vin mi elektis kiel kurieron:  
 Kie vi pasos dum la aeryado,  
 aŭ fine trovos limon de l' migrado,  
 ĉie salutu sur la voj' la Teron.  
 Ah, Teron belan, Teron plej amatan,  
 lulilon, tombon kaj patrinon karan,  
 patrujon solan, heredujon fatan,  
 la Teron vastan, Teron senkomparan...  
 Kaj se vi vidos, kie roko kaŝas  
 sur bord' knabinon en plorad' amara...“  
 La voĉ' rompiĝis, larmino larmon ĉasas.

Jam sur la larĝa voj' pinarbareta  
 kun la krimulo marŝas la kohort'  
 al la montet' malsupre ĉe la bord'.  
 Ekmutis la amaso malkvieta.  
 Ekzekutisto pretan glavon tenas — —  
 La vidon laste levis la arestita vir',  
 ĝin ronden gvidis — nun kun ĝema spir'  
 ĝin klinis teren. Tuja mort' jam venas.  
 Ekblankis lia kol', ekblankis brusto nuda —  
 li genufleksis. — Ve, momento kruda!  
 L' ekzekutisto movas sin retreta —  
 Rapida paŝ' kaj fulma glav-eksvingo:  
 Flugas la glav', la nukon hakas klingo.  
 La kap' forfalis: Salt' kaj salt' ripeta.  
 Jam eĉ la trunk' sin al la tero rulas...  
 Ah, al la bela Ter', la Ter' amata,  
 lulilo, tombo kaj patrino kara,  
 patrujo sola, heredaĵo fata,  
 al Tero vasta, Tero senkompara,  
 al Patrin', al Patrin' — ŝin fila sang' makulas.

Plektate tra la rad' post osto krakis osto,  
 ĝis tuta lia korp' jam pendis sur la fosto.  
 Fostpinte lia kap' lokiĝis sur posten'...  
 Jen mortis de l' Arbar' Terura Suveren'.

Sur lia morta vizaĝ' la lasta sonĝo gardis.  
 La densa homamas' — dum tag' foriri tardis —  
 sub la malalta mont' staris kun muta gazo.  
 Nur kiam ridis kun gaj' la Sun' sur okcidento  
 al la malviva vid' de l' forhakita kapo,  
 la vasta laga bord' mutiĝis en silento.

Super fora montar' la lasta brilo ardis.  
 En absoluta silent' la Lun-vizaĝ' eklumis,  
 la palajn vangojn de l' kap' radie arĝentumis,  
 kaj same sur la bord' la mutan monton farbis.  
 Blanketas kiel nubet' la urbojn en la blu' —  
 Celas la morta vid' trans tiujn urbojn plu —  
 tien — oj, kie li... — ho bela infanaĝ'!  
 longe disportis ĝin la kruda temp-sovaĝ'.  
 For estas la ĵunsonĝ' kiel pasinta obskur'  
 aŭ blanka urbobild' en sin' de laglazur',  
 kiel la lasta pens' de homoj post la mort',  
 kiel ilia nom', bru' de pratempa atak',  
 estingiĝinta radi' el foja lum' de Nord',  
 ton' de rompita harp', sono post kordo-krak',  
 agoj de praepok', mort-stela ilumin',  
 vojo de fora planed', amo de mortintin',  
 nememorata tomb', vaka Eterno-ruin',  
 fum' de ĉesinta flam', post fando bronz-sonor':  
 Jen bela infanaĝ', se vivo pasis for.

Estas majtempo — postvesper' —  
 dua de maj' — la amsezon'.  
 Logas al amo turta kver':  
 „Vilemo! Vilemo!! Vilemo!!!“

El la ĉeĥa T. Pumpr.

# KRONIKO ENLANDA

**Lerneja ministerio pri Esperanto en fakaj lernejoj.** Al sia peto ricevis nia Asocio respondon de la ministerio per dekreto n-ro A—25.786/48—IV/8 el 8. III. 1948, kiu tekstas: »Al via peto el 28. I. 1948 por permeso instrui Esperanton en industriaj, komercaj kaj fakaj lernejoj sciigas la ministerio jenon: Rilate tion, ke la studentaro de fakaj lernejoj de ĉiuj specoj, precipe komercaj kaj industriaj, estas troŝargita pro alta nombro de instruhoroj po semajno, oni povas vian proponon instrui Esperanton trakti sole por instruado en libervola lingva rondeto ekster la normala instrutempo. Kiom ĝi koncernas ceterajn kondiĉojn, turnu Vin senpere al direkcio de elektita lernejo. Pri rezultoj de traktado kaj instruado estu donita tien ĉi sciigo.«

En originalo la dekreto tekstas:

K tamniĵi ĵadosti ze dne 28. I. 1948 o povoleni vyučovani esperantu na průmyslových, obchodních a odborných školách sděluje ministerstvo školství a osvěty toto: Vzhledem k tomu, že žactvo odborných škol všech druhů, hlavně obchodních a průmyslových, je přetíženo vysokým počtem týdenních vyučovacích hodin, možno tamniĵi návrh na vyučování esperanta bráti v úvahu pouze pro vyučování v dobrovolném jazykovém kroužku mimo normální vyučovací dobu. Pokud se týká ostatních podmínek, obraťte se přímo na ředitelství zvolené školy. O výsledcích jednání a vyučování budiž sem podána zpráva. Za ministra: Dr Kalivoda v. r.

La dekreto donas relative grandajn eblecojn por instruado. Ni petas niajn membrojn, precipe profesorojn kaj instruistojn, ke ili uzu ĝin en la venonta lernejaro laŭ povoj. Kaj al la ministerio ni dankas pro tiu ĉi faro.

**Esperanto instruata kiel nedeviga fako ĉe Blahoslav-gimnazio en Ivančice.** Prof. D-ro Rudolf Dokoupil instruas en la gimnazio en Ivančice Esperanton kiel nedevigan fakon en du grupoj al 42 gestudentoj el la V-a ĝis VIII-a klasoj. La permeson li ricevis per ministeria dekreto el la 13-a de oktobro 1947, n-ro A—237.595/47—III/3 por la instruaro 1947/48.

La ministerio por lernejaroj kaj klerigo permesis la instruadon de Esperanto laŭ sia dekreto el la 26/6 1947, n-ro A—135.613—III, alineo 5 (Věstník MŠO 1947, paĝo 363—364), kiu tekstas jene: »Ministerstvo školství a osvěty může povolit jako nepovinný předmět na vyšším stupni středních škol i jiné kroužky, než jsou uvedeny v příloze E výnosu č. A—137.697/46, jestliže bude předložen program takového kroužku a náležitě odůvodněna jeho nutnost.«

Multajn kolegojn, kiuj emas instrui Esperanton en siaj lernejoj, certe interesos ankaŭ la petskribo al la ministerio. Jen ĝi estas: »Ředitelství žádá na základě výnosu MŠO ze dne 21. června 1947, č. A—135.613—III, odstavec 5 (Věstník MŠO 1947, str. 363), aby na zdejší ústavě bylo ve škol. roce 1947/48 povoleno zavedení esperantského kroužku pro žáky vyšších tříd jako nepovinného předmětu.

Ūkolem tohoto kroužku by bylo seznámiti žactvo s pomocným mezinárodním jazykem esperanto po stránce jazykové (mluvnice, překlady z češtiny do esperanta a naopak, konverzáce), s organizací esperantského hnutí a s jeho rozšířením, dále umožniti žactvu praktické využití znalosti esperanta (na př. korespondence se studenty cizích zemí), po stránce výchovné pak pěstovati v žactvu cit mezinárodní pospolitosti a vzájemné snášenlivosti.

Do kroužku se přihlásilo 42 žáků a žákyní ústavu, kteří byli rozděleni do 2 oddělení. Vedení kroužku převzal profesor zdejšího ústavu Dr Rudolf Dokoupil, který začal vyučovati dne 2. září 1947. Jmenovaný prohlašuje, že si nečiní nároku na odměnu, nebude-li esperantský kroužek dodatečně povolen.«

La glaĉio estas rompita, Ivančice estas la fama unua hirundo, kiu anoncas la venantan printempon... Esperantan printempon en niaj lernejoj. Kolegoj, pripensu kaj preparu ĉion kaj ekagu laŭ la modelo de s-ano D-ro Dokoupil.

Gratulon al la instruanto kaj saluton al liaj 42 novaj gesamideanoj! (Th. Kilian)

**Esperanto kiel nedeviga fako en IV-a burĝa lernejo en Liberec** estis permesita por klaso 4-a kaj la kurso kaj lernejaroj 1947/48 de la Landa lerneja konsilantaro (ZŠR) en Praha per ĝia dekreto el 9-a aprilo 1948 n-ro II/5—106/1 laŭ paragrafo 2 alineo 3 de la leĝo 226/1922. Estas instruata en unu klaso, du horoj posemajne de direktoro de la lernejo Stanislav Knížek. Li akceptu dankon pro la persisto, kun kiu li persekutis la aferon kaj la Lernejestraro akceptu dankon pro sia larĝvida decido. La originala teksto de koncerna dekreto estas je dispono ĉe direktoro de nia Lerneja komisiono T. Kilian, profesoro en Třebíč, Příčná strato.

**La petskribo al UNO.** La kampanjo estos finita la 31-an de decembro. La 2-an de aprilo atingis ĝa sumo de subskriboj 3,002.228, Ĉeĥoslovakio estas sur dua loko kun 1,031.464 subskriboj. La grandan suprensalton faris kolektiva subskribo de Sokol kun unu miliono da membroj. La Sokol-unuiĝo akceptu dankon pro sia imitinda decido kaj samideano T. Kilian, kiu gvidis la traktadon, nian gratulon. Ankaŭ dankan mención akceptu Teritoria stabo de skoltoj (Oblastní velitelství Junáka) kiu kontribuis per kolektiva subskribo de 2.100 membroj. Klopodu ankoraŭ kolekti kaj resendĵi la individuajn subskribojn, kiuj ankaŭ validas kaj valoras.

**Urboplano de Hradec Králové** (skalo 1:15.000) eldonita de la urbestro havas klarigan tabelon en la lingvoj ĉeĥa, rusa, angla, franca kaj Esperanto. Al la plano estas aldonita bela presita broŝuro, 64 paĝoj (21×15 cm), kun multaj ĉeflingvaj informaj tabeloj. Estas tie donita sur du paĝoj konciza artikolo pri historio de la urbo ankaŭ en ĉiuj kvin lingvoj. La teksto estas tre bona laŭ la enhavo same kiel laŭ la lingvo. Gratulon al la eldonintoj pro la tre bona aranĝo kaj dankon pro enmeto de Esperanto.

**Dua tutslovaka Esperanto-kongreso** okazos en Košice la 21—23-an de aŭgusto. En la urbo estos samtempe tutŝtata industria ekspozicio. Tial la kongresanoj povos uzi la 50% fervoj-rabaton, aĉetante la enirkarton ekspozician. La sabaton je la 10-a horo estas Laborkunsido, dimanĉon je la deka estas jarkunveno de Slovaka Esperantista Societo, lundon estos ekskursoj. — La kongreskotizo estas 50 Kĉs. Por la Interkonatiĝa vespero sabaton estas akceptataj proponoj de prezentadoj. Loka komitato kongresa estas en Košice, Trnía ul. 3.

**Maja liriko** estis titolo de radio-filmo, elsendata la 3-an de majo 1948 je la 23,00—23,30 de la stacioj Praha II, Morava, Ĉes. Budějovice kiel plua artoprogramo de unuaj lundoj de la monato. Ni laŭdu tiun ĉi fojon precipe la bonegan kvaliton de la tekstoj kunmetitaj de D-ro T. Pumpr (ĉapitro el »Avineto« de B. Němcová, komenco de »Majo«, printempaj versoj de Kalocsay kaj Karolo Piĉ). Versojn de Piĉ ni aŭdis unuan fojon el disaŭdigo. Ni konvinkigis pri tio, kion ni scias: estas versoj efektive. El la aŭditaj deklamoj kaj kantoj precipe nin impresis la vira voĉo deklamanta la »Majon«. Ankaŭ la muzika akompano meritas laŭdan mencion. Gratulon al reĝisoro Ant. Klímeš! Neniu forgesu aŭskulti la unuan lundon junian, kio estos la 7-an de junio kaj ne forgesu konfirmi la aŭdon.

**Pri sukcesa uzo de Esperanto por konigi ĉeĥan literaturon** skribas prof. Jan Filip la 10-an de aprilo: Estante en Nederlando mi vekis intereson de kelkaj tieaj esperantistoj pri nia ĉeĥa lingvo. F-ino T. Durenkamp el Dordrecht en mallonga tempo eklernis la ĉeĥan lingvon kaj nun ŝi tradukas ĉeĥajn librojn en nederlandan lingvon. Antaŭ kelkaj semajnoj aperis en Maastricht ŝia nederlandlingva traduko de mia ĉeĥa libro de porinfanaj rakontoj »U Jezulátka« sub la titolo »Bij het Kindje Jezus« kun trafikaj ilustraĵoj kaj kun antaŭparolo pri Jesu-Infano de Praha kaj pri nia lando ĝenerale.

**Internacia tago de virinoj** estis solenata en Brno la 30-an de marto en granda halo de Stadion, kie kunvenis ĉiuj virinaj societoj de Brno, pli ol 2000 personoj. Prezidis kaj malfermis la kunvenon prezidantino de virina Ago-komitato Marie Krčmářová-Petřeková, kiu postulis antaŭ ĉio fundamentan rajton por homo — rajton je la paco. Parolis poste prez. de la Landa Nacia Komitato Pišek, plue hispana reprezentantino Ellen Dullon. Poste delegitino de UEA M. Adamcová legis saluton de aŭstaliaj virinoj al la virinoj ĉeĥoslovakaj. Prezidantino M. Krčmářová ripetis la saluton al la virinoj de Aŭstralio. Post parolo de kelkaj deputitinoj muzika parto finis la grandan solenon. Alparolo de s-ano Adamcová estis grava faro. Ni gratulas ŝin. (jv)

**Radiostacio Ostrava.** Dum la jaro 1947 elsendadis Radiostacio Ostrava regule 10-minutajn esperantajn programojn kaj nome ĉiumarde kaj ĉiujaŭde je la 22,50 horo kaj pli poste je la 23-a horo. De februaro elsendadis Radiostacio Ostrava en 12 lecionoj po 10 minutoj kurson de Espe-

ranto, kiun gvidis lerte kaj amuze s-ano František Bláha el Zlín. La kurso vekis grandan intereson, ĉar laŭ menditaj lernolibroj, kiujn por la kurso speciale verkis s-ano Bláha, sekvis ĝin preskaŭ 1000 personoj ne nur en Ĉeĥoslovakio, sed ankaŭ en najbaraj ŝtatoj. Laŭ ricevataj leteroj kaj poŝtkartoj Radiostacio Ostrava havas ĝe aŭskultantojn en 20 landoj kaj la plej malproksima aŭskultanto s-ano C. M. Cather troviĝas en Ramleh, Egiptujo. Li konfirmas bonan kaj klaran aŭdeblecon, sed nur plendas, ke elsendado okazas en tre malfrua nokta horo. En esperanta elsendado ĉe Radiostacio Ostrava kunlaboras s-anoj Vladimír Slaný, Zdeněk Raška kaj Adolf Staňura. En la jaro 1948 esperanta elsendado okazas regule ĉiumarde kaj ĉiujaŭde je la 23-a horo sur la ondo 259 metroj laŭ mez-eŭropa tempo normala krom la unua mardo en la monato. Se ni volas konservi daŭran sukceson por Esperanto ĉe tiu ĉi radiostacio, estas necese, ke gesamideanoj ofte skribu al Radiostacio Ostrava, ke ili aŭskultas esperantajn programojn, ĉar nur tiamaniere ni atingos tie daŭran pozicion por nia kara Esperanto. (V. S.)

**Esperantlingvaj resumoj en ĉeĥaj sciencaj libroj.** Komerca ĉambro en Olomouc en kolekto de libroj de ĝi eldonata enmetis en tri el ili resumojn en la rusa, franca, angla kaj Esperanto. Jen iliaj titoloj: Ing. Fr. Hnílica, Disvolvo de elektrizo en orienta kaj norda Moravio (Vývoj elektrisace východní a severovýchodní Moravy), prezo 36 Kĉs. Dr. Mil. Pokorný, Esploro en Moraviaj ŝtonminejoj (Průzkum v moravských ložech), prezo 18 Kĉs. Th. Jordán z Klausenburku, Libro pri kuracaj aŭ varmaj akvoj Moraviaj (Kniha o vodách hojitedlných neb teplicech moravských), prezo 60 Kĉs. La libroj estas riceveblaj de nia Librovendejo. La komerca ĉambro akceptu nian gratulon pro sia saĝa decido.

**Propagando per afiŝoj en tramo en Olomouc.** Esperantista Societo en Olomouc surgluigis por februaro-septembro en la urbaj tramveturiloj diafanajn afiŝetojn kun verda stelo kaj sekva ĉeĥlingva teksto: »Uzu modernan lingvon Esperanto! Vi helpos al tutmonda interkompreniĝo kaj paco. Vi faciligos por vi kontakton kun fremdlando, do vi ŝparos tempon kaj monon. Informoj ĉiun jaŭdon je la 19—21 horo en klubejo de la Esperantista Societo en Olomouc, Masaryk-placo 25.« — Ĝi estas tre deca formo de propaganda, tre imitinda, ĉar ĝi turnas sin al amaso.

**Ĉeĥlingvan kronikon »El la Esperanto-mondo«** (Z esperanského světa), verkatan de Julie Šupichová, publikigas de post novembro 1947 ĉiumonate revuo instruista »Škola a kultura« (Lernejo kaj kulturo), eldonata de la Kleriga fakko de la ĉefurbo Praha. La kroniko akcentas precipe informojn pri Esperanto en lernejoj. En la numero el 1. III. 1948 aperis recenzo pri la broŝuro Kdo je L. L. Zamenhof. Ni enskribas tiun ĉi fakton en nia kroniko, ĉar ĝi estas unuan fojon post la milito, kiam pedagogia revuo aperigas regule informojn pri nia afero.

# LINGVO

## 17. úkol k překladu:

Klement Gottwald k prvním máji: Unorové události možno tak přirovnat k jarní bouři, která vyčistí ovzduší, smyje kal, a po níž celá příroda rychle rozkvétá. A je historickým faktem, který dnes uznává s vděčností celý národ, že v této veliké zkoušce stála v čele republiky, v čele toho velkého obrodného hnutí, naše komunistická strana jako prozíravý, rozhodný a obezřetný vůdce a že se tak ukázala zachránce republiky a jejího pokojného vývoje. První máj je nám proto slavným a radostným svátkem nového velikého vítězství pracujícího lidu vedeneho komunisty a zároveň i svátkem nové nadšené práce na výstavbě naší domoviny. První máj je však i velikou přehlídkou zdravých, demokratických sil našeho národa před volbami, v nichž náš lid svobodně řekne znovu svůj soud o dnešní cestě republiky. Není sporu — a potvrdí to jistě i manifestace 1. máje — že řekne znovu své „ano“. Jde nyní o to, aby znělo co nejhlasitěji, aby je slyšeli s radostí i naši přátelé za hranicemi a aby zakřiklo zlobné štvance našich nepřátel. Jde o to, aby toto „ano“ bylo podnětem k novému rozmachu lidových sil, aby naplnilo náš lid tvůrčím optimismem a posílilo jej k další vytrvalé a obětavé budovatelské práci.

## Traduko de la 16-a teksto:

Jan<sup>1</sup> Masaryk en la radio<sup>2</sup> la 31-an de decembro 1944: Nun parolas al vi ministro de l<sup>3</sup> eksterlandaj aferoj, ne nur Jan Masaryk. Nia eksterlanda politiko en<sup>4</sup> la jaro 1945 estos bazita<sup>5</sup> sur firma, neŝanĝebla kaj potenco<sup>6</sup> fundamento de nia kontrakto kun Soveta Unio.<sup>7</sup> Ĉion, kio rezultas el ĉi tiu (nia) bazo, ni plenumos centprocente senhezite kaj senkompromise. Kelkfoje<sup>8</sup> oni parolas pri ni, certe tre bonintence,<sup>9</sup> kiel pri ponto inter oriento kaj okcidento kaj eĉ mi mem estis nomita<sup>10</sup> de neinformitaj homoj<sup>11</sup> propagandisto<sup>12</sup> de ĉi tiu teknika formulo. Ni neniam kaj al neniuj<sup>13</sup> nin proponis<sup>14</sup> nek proponas esti ponto. La glora Sovetunio kaj la grandaj demokratioj okcidentaj ne bezonas nin kiel ponton. Sur la ponto oni marŝas<sup>15</sup> kaj tio neniel konvenas al ni.<sup>16</sup> Niaj rilatoj al la ceteraj najbaroj direktiĝos sub la vidangulo<sup>17</sup> de nia soveta kontrakto.<sup>18</sup> Ni deziras demokratan, fortan Pol-

landon,<sup>19</sup> sed nur tian, kiu kunlaboros kun Soveta Unio. Por alia solvo de la pola problemo ni havas nek tempon nek emon. Ni deziras honestan demokratan Hungarion, kiu lasos nin por ĉiam en paco,<sup>20</sup> sed nur Hungarion, kunlaborantan kun Soveta Unio. La samo validas<sup>21</sup> pri Jugoslavio, Aŭstrio kaj Rumanio. Nia rilato al la okcidentaj Aliancanoj ne ŝanĝiĝis kaj ne ŝanĝiĝos.<sup>22</sup>

## Poznámky k 16. překladu:

<sup>1</sup> Křestní jména bez potřeby nepřekládáme. Tim méně u Jana Masaryka, kterého i v cizině píšou Jan; <sup>2</sup> „dis-aŭdigo“ je pěkný překlad, odpovídající i českému „rozhlás“, ale dáváme přednost mezinárodnímu „radio“; <sup>3</sup> ministro por...; <sup>4</sup> dum; <sup>5</sup> naše politika bude záležet na základě... nejlépe: estos bazita, baziĝos sur fundamento. Jinak záležeti na ĉem = dependi de io, záležeti v ĉem = konsisti en io; <sup>6</sup> fortega; <sup>7</sup> z forem sovietaj, sovjeta, soveta ustálila se poslední, soveta. Stejně: Soveta Unio, Sovetunio, Sovetio; <sup>8</sup> iam; <sup>9</sup> tre „bona fide“; <sup>10</sup> markita, signita, indikita; <sup>11</sup> kaj neinformitaj homoj eĉ citis min kiel propagandanton de ĉi tiu teknika formulo (Ochotný); <sup>12</sup> propagandanto; <sup>13</sup> disponiĝis; <sup>14</sup> ni neniam proponis nin al iu; <sup>15</sup> iras, paŝas, la ponton oni transiras; <sup>16</sup> kaj tio ja ne tro plaĉas al ni; kaj tio ne ĝuste konvenas... <sup>17</sup> direktiĝos laŭ la mezurangulo; <sup>18</sup> de nia kontrakto kun Sovetunio; <sup>19</sup> Polujo, podobně Rumanujo, ale jen Aŭstrio, Hungario, Jugoslavio; <sup>20</sup> kiu unu fojon por ĉiam lasos nin en trankvilo, lasos nin trankvilaj; <sup>21</sup> ne ŝanĝiĝis nek ŝanĝiĝos.

Dostali jsme celkem 21 překladů. Zaslali je: Josef Eliáš, Kunderatice; Ant. Harna, Šternberk; J. J. Horák, Měšice; Zd. Hřel, Praha; L. Kavková, Přerov; Josef Košutek, Mor. Nová Ves; Jan Kožušník, Kunčice n. O.; Frant. Kuba, Olomouc; J. Lavička, Tachov; Alf. Macek, Pulgáry; Fr. Mančík, Horní Němčí; Frant. Nálevká, Pardubice; Frant. Ochotný, Kladno; Jul. Procházková, Rajhrad; V. Růžička, Podmokly; Zd. Řezáč, Tanvald; Ant. Schöblová, Beroun; MUDr. Fr. Vaněk, Nová Role; An. Vavrušová, Praha; M. Wadasová, Olomouc; B. Weinerová, Hradec Králové.

Překlady byly většinou velmi dobré. Obratnost v překládání roste. Jen bychom si přáli najít touto cestou ještě další překladatele, na něž bychom se mohli v případě potřeby obrátit.

Z nejlepších byla losem vybrána práce p. Zd. Hřela, kterému zasíláme knížku, ostatním pak děkujeme za účast a doufáme, že vytrvají i že získají ve svém okolí další účastníky. Hm.

## LOKAJ INFORMOJ

**Benešov.** — Distrikta peranto: Jan Zdvihal, direktoro e. p. Týnec n. S. 141.

**Bohumín.** — Ĉe tiu grava apudlima fervojstacio estis fondita Fervojista Esperanto-Klubo. En la komitato oni elektis s-rojn: Kaminský Rudolf, prezidanto, Heřmánek Antonín, sekretario, Trombala Adolf, direktoro de Esperanta kurso, kiun gvidas ĉiu vendrede en fervojista lernejo por 20 personoj ŝtate ekzamenita instruisto de Esperanto s-ano Vladimír Slaný el Ostrava. Estus tre rekomendinde kaj ĝojige, ke ankaŭ aliaj fervojstacioj en Ĉeĥoslovakio sekvu la ekzemplon de fervojstacio Bohumín. (V. S.)

**Borotín.** — Kurson por skoltoj dum novembro-marto gvidis J. Vyčichl por 18 p.

**Brno.** — Programo de kunvenoj: 4. 5. Kiel mi iĝis esperantisto (Jiří Kořínek). 11. 5. Rumanio kaj Nederlando pere de Esperanto (Josef Friedrich). 18. 5. Ĉiam kun bona humoro (Rudolf Nečas). 25. 5. Nia prezidento D-ro Edvard Beneš 64-jara. 1. 6. Kiel oni faras ĵurnalon (Jaroslav Vyhlička). 8. 6. Nutrado kaj sano de l' moderna homo (Josef Handl). 15. 6. Rigardo en novtempa ĉeĥa literaturo (Nelly Zitová). 22. 6. Ĉapitroj el la Malnova Testa-

mento (Inĝ. Vinc. Kroužil). 29. 6. Misio de nacioj en iliaj literaturoj (Josef Vondroušek). 13. 7. Esperanto kiel socia faktoro (Jan Pávek). 20. 7. Kion ni scias pri nia Tero? (Tomáš Borkovec). 27. 7. Amika babilado. 3. 8. Sokol-idealo en vivo de nia nacio (Lubomír Nečas). 10. 8. Ni ekkonu nian urbon! (Jaroslav Ječmínek). 17. 8. Ĉeĥa paradizo (Emil Vágnr). 24. 8. Letervespero. 31. 8. Aŭstralio kaj Nov-Zelando, kiel mi ilin konas pere de esperanta korespondo (Miroslav Matoušek). — Krom la programo lasthoraj informoj pri la movado, konversacio, vigla societa vivo. Biblioteko, gazetaro disponebla. En via intereso vizitadu regule la kunvenojn. Memoru bone: mardo, tago de brna esperantistaro, en hotelo Passage, Lidická 23.

**Brno-Židenice.** — Loka grupo de EAĈSR kun 30 m., fondita en februaro, aranĝis la 26-an de februaro solenan unuan jarkunvenon. Partoprenis 26 membroj, 6 gastoj. Elektaj: prez. Milda Jakubcová, Potácelova 70, Brno 15; vicprez. Rajmund Stehlik, Táborská 172, Brno 15; sekr. Jan Šereda, Nopova 47, Brno 15; kas. Jan Strejček, Kukulenská 39, Brno 15; arkiv. Karel Večera, Spáčilova 57, Brno-Černovice; bibliot. Ervín Štěpánek, Školní, Brno-Černovice; reviz. Vojt. Falta, Šaldova 18, Brno 15, Fr.

Jakubec, Potácelova 70, Brno 15. Korespondanto al prez. aŭ sekret. Finiĝis la unua kurso por komencantoj kun 30 p., daŭras kurso por progresantoj.

**Celovec.** — Kurso por 15 p. gvidata de P. Fabián. (E. S.)

**Dolní Suchá.** — En la ĝen. kunveno de la Loka Grupo A. Odehnal parolis en Esperanto pri la vivo de D-ro Zamenhof kaj J. Bernatik ĉefe: Kion Esperanto povas doni al la homaro. Nova komitato estis elektita: Prez. Emil Klimsza, sekr. Emil Przczek.

**Domousnice.** — En tiu malgranda vilaĝo, nombranta ĉirkaŭ 300 loĝantojn, sukcesis la reg. peranto K. Šolc malfermi kurson, en kiu li en vintro 1947—48 instruis. Loka peranto estas s-o Fiala. Estis fondita loka rondeto kaj oni antaŭvidas ĝian evoluon.

**Karlovy Vary.** — Sekretario de la Esperanto-Klubo J. Černý rezignis. La funkcion transprenis denove la unua kluba sekretario s-ano Antonín Pilař, Okružní 8.

**Kolín.** — La ĝen. kunv. de Esp. klubo la 29-an de januaro partoprenis 11 membroj. Estis elektitaj: prez. Jan Janda, ofic., Komenského 194, Kolín IV; vicprez. Vojt. Koláček, ferv. ofic., Sedlec pod Kaňkem; sekret. Josef Chmelík, faka instr., Šotnovská 173, Kolín II.; kas. Václav Karel, ofic., Heverova 223, Kolín IV. Kunv. duan jaŭdon en ĉiu monato je 20-a horo en kafejo de Lidový dům. La klubo abonas por urba publika legejo la revuon „Esperantista“, ĝi prizorgas propagandan montran keston en ĉefa strato.

**Kosmonosy.** — Kurson por studentoj de burĝa lernejo gvidas A. Rauvolf.

**Košice.** — Regulaj kunvenoj en ejoj de Katolika rondo ĉiun merkredon je 19-a horo. Kremer gvidas novan kurson por 20 komencantoj, plejparte studentoj de la Industria lernejo.

**Liberec.** — II-a ĝen. kunv. de Esp. klubo okazis la 25-an de februaro. Estis elektitaj: prez. inĝ. Karel Fanta, supera teknika komisaro fervoja, Liberec, stacidomo; vicprezidanto Ota Mader, ĉefinstruisto, Liberec-Janův Důl n-ro 86; sekret. Augustin Chlum, Liberec-Nové Pavlovice; kas. Břetislav Bím, lokomotivestro, Družstevní 410, Liberec-Horní Růžodol.

**Litoměřice.** — La 15-an de januaro estis fine starigita E-klubo en tiu loko. Fondan kunvenon partoprenis 22 p., el kiuj 16 aliĝis. Estis elektita prez. d-ro Jos. Černý. Li kun fervojisto Vejvoda vizitis la fervojan direkcion en Ústí nad Labem, kie oni promesis ĉiufankan subtenon. Al kurso komenciĝanta la 9-an de februaro, gvidata de d-ro Černý, aliĝis 33 fervojistoj. Intereson pri E. montras ankaŭ la lokaj sindikatoj ÚRO. Kun esp-istoj en Teplice-Šanov kaj Ústí n. L. estis interkonsentita komuna propaganda laboro. La klubaj kunvenoj okazas ĉiujŝaŭde je la 20-a horo, partoprenas meznombro 20 p.

**Milevsko.** — Distrikta peranto: Frant. Hanzlík, dentisto, Křenovice, pp. Bernartice.

**Mladá Boleslav.** — Dum la aŭtuna-vintra sezono 1947-1948 estis 1 kurso publika komencula, 2 lernejoj, 1 por progresintoj. Tri el ili gvidis la regiona peranto K. Šolc, unu instruisto A. Rauvolf. Sume 70 p. En ASAP-automobilfabriko kurso de ÚRO-lernejo, gvidata de K. Šolc. S-o K. Šolc prelegis pri Esperanto dum tiu ĉi lernejjaro al studentoj de la du gimnazioj, tri burĝaj lernejoj, komerca akademio, Landa ekonomia lernejo; aŭskultis liajn prelegojn sume 700 studentoj.

**Náchod.** — Prof. Jan Filip instruas dum tiu ĉi lernejjaro Esperanton en Studa rondo de gimnazia aŭtonomio studenta. Aliĝis pli ol 60 studentoj.

**Nové Benátky.** — En publika kurso en vintro 1947/48 organizita de s-ano Věk instruis s-o A. Rauvolf. Estis fondita loka grupo, prezidata de Věk; ĝia unua entreprenon estis prelego de s-ino A. Alamo.

**Nový Bohumín.** — Generala kunveno de Esperanto-Klubo 16. 1. 1948 en hotelo Avion. En komitaton oni elektis jenajn gesejorojn: Prezidanto Alfons Kermel, vicprezidanto Adolf Trombala, sekretario Marie Szymczková, vicsekretario Jan Podolski, kasistoj Pavel Trombik kaj Václav Žingor, bibliotekistoj Ludmila Potocká kaj Bedřiška Krumníková, revizoroj Jmřich Ulrich kaj Charlota Baranová. Esperanto-Klubo en Nový Bohumín kune kun Laborista Akademio malfermis pasintjare en aŭtuno kurson de Esperanto, kiu ankoraŭ daŭras kaj instruas en ĝi s-ano Vladimír Slaný. Kunvenoj ĉiuvendrede je la 19-a horo en hotelo Avion. (V. S.)

**Olomouc.** — Kurso (dua) en Dobrovský-popol-lernejo finiĝis la 26-an de majo. — Junulara fakto de Esperantista societo kunvenas depon aprilo aparte en klubejo de la Studenta hejmo ĉiun merkredon je la 18—20 horo. — La E. Societo kunvenas depon majo krom la regulaj kunvenoj jaŭdaj ankaŭ ĉiun mardon je la 18-a horo en la urba parko ĉe la E-memorŝtono. — En majo aperis dupaĝa multobligita „Informilo Haná—Jeseniky“, eldonata de Vl. Blažek en Olomouc, Dvořákova 36. — Poŝtkarto kun Olomouc-silueto estas denove ricevebla de la Societo po 50 heleroj.

**Opava.** — Ĉe Bezruč-popollernejo estis la 8-an de marto 1948 malfermita kurso de Esperanto kun 30 partoprenantoj. La instruado okazas ĉiulunde je la 18,30 horo en la gimnazio kaj gvidas ĝin s-ano Vladimír Slaný. La kurso efektiviĝis helpe de s-ano A. Frantl kaj distrikta kultura inspektoro s-ro Jan Pišala, en kiu ni trovis grandan subtenanton de nia afero. Post finiĝo de la kurso estos tie tuj fondata Esperanto-Klubo. Ni tre ĝojas, ke ankaŭ en tiu parto de Silezio estis vekita intereso pri Esperanto. Ĝi estas versimile unua ĉefa kurso en tiu ĉi grava urbo. (V. S.)

**Ostrava.** — Ĉe Pli supera Masaryk-lernejo estis ankaŭ en printempo malfermitaj kursoj de Esperanto. Por komencantoj kun 30 partoprenantoj kaj por progresintoj kun 12 partoprenantoj. Ambaŭ kursojn gvidas s-ro Vladimír Slaný. — La 11-an de februaro okazis ĝenerala kunveno de Esperanto-Klubo Ostrava I. en klubejo de hotelo Imperial. Estis elektitaj: Prezidanto Vl. Slaný, vicprezidanto K. Majtner, sekr. K. Janouš, 1. kasisto M. Kuchař, 2. kasisto L. Klegová, bibliotekisto Z. Raška, komitatanoj M. Šnědar, J. Bohanus, revizoroj dr. R. Pawlík, L. Vajdik. Ĝeneralan kunvenon partoprenis gastoj kaj reprezentantoj el najbaraj kluboj, kiuj la kunvenon kore salutis. Post la kunveno estis aranĝita amuza programo.

**Ostrava-Kunčičky.** — Esperanto-klubo okazigis la 22-an de februaro post sia kvinmonata ekzisto sian duan ĝen. kunv. Estis elektitaj: Prez. Jos. Hanzelka, vicprez. Ĉeněk Klika, sekret. Arnošt Hojdys, kas. Václav Smetana, prot. Taňa Klenová. Kurson por komenc. kun 24 p. gvidis laŭ Cseh-metodo J. Hanzelka. Kunvenoj ĉiun lundon je 18-a horo en domo de KSČ.

**Ostrava-Vitkovice.** — En hejmo por metiistaj lernantoj ĉe Nacia entrepreno de Vitkovice-aj ferfabrikoj estis malfermita ankaŭ nunjare kurso por 26 metiistaj lernantoj, kiuj estas ĉiuj slovakoj. La kurson gvidas s-ano Vladimír Slaný, kiu klopodas pri tio, ke Esperanto havu daŭran pozicion en tiu ĉi plej grava ferindustria nacia entrepreno. (V. S.)

**Pacov.** — Kurso komenciĝis en decembro 1947, aranĝas Popolkleriga lernejo, instruas Jar. Kóktán 37 partoprenantojn.

**Pardubice.** — Ĝen. kunv. de la Esperant. klubo „D-ro Schulhof“ okazis 27-an de februaro en solene ornamita klubejo de hotelo Nový Pernštýn. Estis elektitaj: Prez. R. Veverková, vicprez. Ant. Jandík, sekret. Fr. Nálevka, prot. Mil. Pohorská, vicprot. Jan Večeře, kas. Bohumil Kupa, bibliot. kaj gvid. de amuza sekcio Anna Boušková, vicbibliot. Jar. Köhler, reviz. Oldřich Zeman kaj Josef Pohan. Distrikta Nacia Komitato (ONV) donis subtenon de 500 Kčs, la ekspozicio de poŝtmarkoj ankaŭ 500 Kčs. Oni diskutis pri nova regiona peranto, sed senrezulte. Depost 12-a de marto daŭras kurso por komencantoj en klubejo. Partoprenas 12 p., instruas Fr. Nálevka. Nova adreso: Esperantista klubo „D-ro Schulhof“, Pardubice. La Loka Nacia Komitato (MNV) preparas eldonon de e. flugfolio pri Pardubice kaj ĉirkaŭaĵo. Al ambaŭ Naciaj komitatoj, kiuj montras seriozan intereson, esprimas la klubo sian sinceran dankon. La klubo sukcesis varbi sufiĉe multnombrian Amikaron de Esperanto inter la loĝantoj de Pardubice.

**Pelhřimov.** — Distrikta peranto: Jaroslav Kóktán, terkulturisto en Nová Ves, p. Pacov.

**Plzeň.** — En la jaro 1947 nia movado estis iomete pli vigla ol en la jaro 1946. Sopirante je sukceso ni per ĉiuj fortoj entreprenis propagandon, por ke ni atingu nombron da membraro, kiu ekzistis en nia urbo antaŭ la lasta milito, proksimume 700 samideanoj. Ĉar niaj maljunaj samideanoj aspektas iom lacaj, ni turnis la propagandon al la junularo; estis aranĝitaj kelkaj kursoj: 1. Klubo de

Okcident-Bohemiaj Esperantistoj kun Lidová Universita Husova printempe 1947 por komencantoj, kiun vizitis 16 lernantoj, el kiuj restis fidelaj 12, la kurso estis finita 18. III., kaj de tiu dato estis komencita kurso por progresantoj, kiun daŭrigis 12 personoj. Instruas s-o In. Gross. 2. Samideano J. Pech kaj F. Karas prelegis en Zbirov, kie oni aranĝis kurson, kiun vizitis 24 komencantoj. Instr. J. Pech, F. Karas. 3. Klubo O. B. E. kun Lidová Universita Husova aŭtune aranĝis kurson por komencantoj, kiun vizitis 13 personoj, kaj lastatempe ni aranĝis kulturfakon por junularo, kiun vizitas 20—27 personoj. Instr. St. Šimák, I. Gross, Svoboda. 4. Samideano G. Menšík, Plasy, fondis en tiu loko grupon kaj 16. XI. li havis tie paroladon pri signifo de Esperanto ĉefe por nia ĉefia nacio; estis aranĝita kurso por komencantoj, kiun vizitas 16 personoj. — Paroladoj okazis: 1. II. parolis s-o In. Gross pri „Nia programo dum kuranta jaro por sukceso de nia propagando“. 1. III. prelegis inĝ. R. Novák pri temo „La arto honoras laboron“. 26. III. S-o J. Pech, vojaĝanto en proksima Oriento, pri „La malkvieta Palestino“ kun lumbildoj, ĉeflingve, en Kulturo-domo, ĉeestis ĉ. 200 p. 19. IV. Janinka de Oers el Rotterdam: Pri vivo en mia patrujo, pri ĝia kulturo, homamikeco, ĝentileco, pri la hollanda reĝino. En Měštanská beseda, ĉeestis 160 p. 23. IV. La samo kun lumbildoj en la Kulturdomo. 10. V. Frant. Kavan: Rememoroj pri nia liberigo kaj pri nia dummilita turmentado. En Měštanská beseda. 12. VII. Fr. Kavan: Honorigo de la 60-jara jubileo de nia nobla ideo. Dum la solenespero parolis ankaŭ kleriga inspektoro sinjoro Č. Štěrba kaj ornamis la programon per kantoj kaj muziko s-ro St. Šimák kaj s-ino Katuše Šimáková. 18. X. Inoc. Gross: Impresoj el la Berna kongreso, pri belecoj de Alpoj, pri la etoso de la lando donanta azilon al diversaj rifuĝintoj (ĉeflingve). 16. XI. Fr. Kavan: Ideo de internacia lingvo kaj ĝia signifo precipe por malgrandaj nacioj, kia estas nia nacio ĉeĥa. Ĉeflingve en Plasy. 25. XI. Fr. Kavan: Jubileo de Esperanto. Ĉeflingve parolita en Radio-Plzeň. Aperos presita. 17. XII. Frant. Kavan: Pri signifo de Esperanto por eksporta komerco. Ĉe finiĝo de kurso en Kulturo-domo, ĉeflingve. — Kunvenoj de la Klubo okazas ĉiun sabaton je la 20-a horo en Měštanská beseda kaj ĉiun mardon de ĝia Junulara kultursekcio je la 19-a horo. — La ĝenerala jarkunveno de la klubo okazis la 5-an de aprilo 1947. La societo „Kulturo“ kunvenas ĉiun merkredon en Kulturo-domo, Gorký-strato n-ro 1. (Fr. Kavan)

**Podmokly.** — Kurson por laboruloj de la bierfabriko aranĝas en marto-majo entreprena konsilantaro, kiu pagas por la 12 partoprenantoj la kurskotizon. Instruas s-o Růžička. Granda entuziasmo. Ĉar mankas lernolibroj, la kursanoj mem kopiis por si la Kilian-lernolibron.

**Poproč.** — Kurso gvidata de lernejestro E. Grich por 15 p. depost la 8-a de januaro. (E. S.)

**Praha.** — Inĝ. Josef Kochman instruas E. depost 5-a de februaro al 18 lernantoj de la plej alta klaso de la Unua ŝtata industria lernejo maŝinfaka en strato Betlemská 4, Praha I.

**Přerov.** — E-kurso komenciĝis la 4-an de decembro kun 21 p. Faka instruistino Ludmila Kavková instruas laŭ lernolibro de Kilian kaj per bilda metodo.

**Semčice.** — Kurson en lernejo gvidas s-o K. Šolc.

**Slezská Ostrava.** — Kunvenoj de Esperantista rondeto ĉiun vendredon je la 19-a horo en la klubejo Lidový dům, Na Kamenci.

**Tábor.** — En la ekspozicia fenestro de fremdultrafika oficejo estis elpendigita belaspekta porcelana tabulo en ses diversaj lingvaj alparoloj: ĉeĥa, rusa, angla, franca, germana kaj esperanta: *Čeňoslovaka vojaĝa informaservo*. Ankaŭ la verda stelo kun E en la mezo montras al la publiko, ke Esperanto servas. En la urba legejo estas elpendigitaj niaj gazetoj „Esperantista“, „Esperantisto slovaka“, „Esperanto“, eldonata de la klubo en Hradec Králové, nia oficiala „Esperanto“ el Genevo, „Internacia kulturo“, „Juna vivo“ kaj aliaj. „Esperantista“ estas ankaŭ en la legejoj de ambaŭ gimnazioj, en la agronomia lernejo kaj en la komerca akademio. La unuan de majo ankaŭ nia surstrata ŝranketo estis bele ornamita kaj atentigis pri esperanta liberecoĝo. Ni kunvenas regule en nia klubejo en hotelo Znamenáček ĉiun mardon je la 19-a; kiu alvenas post kelkaj forestoj, kon-

statas ĉiam, ke li ne parolas jam tiel flue kiel la aliaj. Jam sentas sian malhavon de praktiko. Sed ne malgraŭ tio, sed ĝuste pro tio alvenadu ĉiam regule! Ni duonigas nian programon. En la unua duono ni gvidas kurson por progresigo de ĉiuj. Ni lernas instruante. Ĉiu estas samtempe lernanto kaj instruanto; en la dua duono de la vespero ni ordinare dece amuziĝas. Rakontas bonmorajn anekdotojn, legas alvenintajn leterojn kaj poŝtkartojn el eĉ iam nekonataj landoj, citas la plej interesajn artikolojn el la gazetaro, kiu kuŝas sur la tabloj. Ni montras eltranĉitajn notojn el nia ĉefia gazetaro, kie temas pri anoncata novaĵo el nia movado. Ni surgluas ilin en libron kaj antaŭmetas ĉiam jam riĉan kolekton de priesperantaj eltranĉaĵoj gazetaj. Ni fondas ankaŭ bibliotekon kaj oni povas pruntepreni librojn. Ni kantas, ni recitas poemojn, ni prelegas, ni proponas novaĵojn, ni meditas pri plibonigoj de propagando, ni interkonsiliĝas, kiamaniere regajni Vin, kara leganto, ke Vi denove regule alvenadu al ni! Pruvu al ni, ke Vi atente legas nian organon kaj alvenu. Ĉiam Vi agrable pasigos la vesperon. Ni intencas nun aranĝi dimanĉajn ekskursojn. Alvenu do, ke ankaŭ Vi kune ĝoju kaj ĝojigu. Ĝis la revido! — Distrikta peranto estas s-o JUDr. J. Railich, Pod ptákem 380. (Dr. H. Jokl)

**Tanvald.** — Post sukcesa finiĝo de aŭtuna elementa kurso aranĝis la loka E-klubo printempan kurson por komencantoj kun 8. p. Instruas laŭ Kilian-lernolibro Z. Řezáč. Ejon por la kurso disponigis afable s-o Minařík, estro de „Grandhotel Tanvald“.

**Turnov.** — E-kurso, preparita aŭtune de la Komerca akademio, ne okazis pro nesufiĉa preparo. Tuj membroj de la loka E-klubo aranĝis en ĉefa strato en montra fenestro ekspozicion de esperantaĵoj, projekciis en urba kinejo propagandan diapozitivon kaj per grandaj afiŝoj invitis al unua provleciono de preparata kurso. La klaso estis pleneĝa kaj proksimume duono tuj aliĝis. La kurson gvidas faka instruisto Alois Bobek. Li ankaŭ zorgas pri regula informado de „Pojizerské listy“.

**Zlín.** — Loka grupo estis fondita la 9. II. 1948 helpe de Fr. Blaha kaj J. Zeman. En komenco ĝi havas 40 membrojn. Dum la jaro 1947 aperis en la regionaj gazetoj Tep, Ĉin, Zdar, Obroda sume 22 artikoletoj de Fr. Blaha.

## RADIO

**Radio-Svislando** (ondoj 25,61 m kaj 48,66 m):

Marde 18,05 MET somera parolas D-ro A. Baur pri Svislando;

jaŭde 18,05 MET parolas D-ro E. Privat pri federalismo kaj paco.

Aŭskultantoj bonvolu skribi al: Schweizer Kurzwellendienst, Neuengasse 28, Bern (Svislando).

Vydali jsme rozšířený

# Velký slovník

esperantsko-český

od prof. J. FILIPA a K. FILIPA.

446 stran 12×18 cm v plátěné vazbě.

Cena Kčs 200.— mimo poštovné.

Nakladatelství Společenských podniků  
v národní správě,

Přerov, Masarykovo náměstí 17.



# NI LEGIS

**La homaro retrovos la pacon.** Sub tiu ĉi titolo ni legas en Internacia kulturo (novembro 1947) en letero de Simon Mkrliĉjan (ulica Gnumi 3, Erevan, Armenio, USSR) sekvan finon: Nia granda patrujo Sovetlando, kiu estas citadelo de la internacia demokrata movado, kiel grandega koloso staras sur la antaŭposteno en tiu ĉi batalo kaj sub la gvido de nia amata kaj genia stratego Stalin antaŭenpuŝas la internacian demokratian movadon al pli altaj pozicioj. Ni ĉiuj estas plenaj de kredo, ke la definitiva venko estos nia.

**Pri Somera E-Lernejo en Doksy 1947** verkis ĉeflingvan artikolon en ĉeĥa gazeto „Hospodár“, aperanta en Nebraska (Usono) ĉeĥa instruisto en Jugoslavio Jarka Ditrich. Partoj el tiu artikolo estas presigitaj en „Právo lidu“ 24. III. 1948 en ampleksa artikolo de Jiří Cach.

**Pri ĉeĥa studento Bohuslav Bárta**, kies talento promesis, ke li fariĝos poeto, kaj kiu, kondamnita al la morto, atendante ĝin dum kvin monatoj en morto-ĉelo en jaro 1943, sukcesis registri siajn travivaĵojn kaj sentojn, informas artikolo de Jar. Mařík en Internacia kulturo (el novembro 1947). La artikolo estis tradukita en la danan kaj aperis en Land og folk 25. III. 1948.

**Informilo de I. G. E. L.**, organo de grafikaj gelaboristoj tutmonde. Poŝtkesto 12, Ulvsunda, Svedio. Multobligita dumonata bulteno. Ni ricevis duan numeron el la 15-a de aprilo; 6 paĝoj kun informoj efektive fakaj por grafikistoj.

**Bildoj de Gracodona Jesu-Infano de Praha** estis eldonitaj kun esperantlingva surskribo aŭ kun esperantlingva traduko de „Preĝo de P. Cirilo de Dipatrino, la unua adoranto de Jesu-Infano de Praha“.

**Internacia soldata lingvo.** Sub tiu ĉi titolo E. P. Ockey en Heroldo de E. (1. IV. 1948) konstatas sekvan fakton: En Italio la problemoj de lingvo de invadintaj britaj kaj amerikaj soldatoj, vivantaj poste en itallingva medio, solviĝis en maniero tre interesa por ni esperantistoj. La anglaj kaj amerikaj soldatoj, kiuj surteriĝis en Sicilio en julio 1943 krom kelkaj italdaj usonanoj tute ne sciis la italan lingvon. La celo de la invado estis sekreta al la invadantoj. Ili do neniel povis prepari sin per lerno de la itala lingvo kaj la anglalingvaj lernolibroj pri la itala lingvo ne akompanis ilin. Oni ofte aŭdas la diron, ke la angla lingvo jam funkcias kiel internacia lingvo. Do oni povis supozi, ke la angla lingvo pruviĝos interkomprenilo inter italoj kaj la anglaj kaj usonaj soldatoj. Sed tio ne okazis. La soldatoj konstatis, ke la kamparanoj tute ne komprenas la parolatan anglan lingvon. Sed la itala lingvo estis sufiĉe komprenebla de angloj kaj ĝia prononco estis facile imitata. Elementa formo de la itala lingvo do fariĝis la internacia lingvo inter britoj kaj italoj. Ĝi estis uzata eĉ inter poloj kaj angloj, ĉar ankaŭ polaj soldatoj trovis la italan lingvon multe pli facile lernebla ol la anglan. La angla lingvo tute ne taŭgis nek iu simpligita formo de ĝi. Tiu sperto konvinkis min, ke la provlingvo Basic English ne havas estontecon...

Oni iam plendas, ke la esperantaj vortoj estas tro longaj, sed la itala estas ankoraŭ pli longaj. Mi ne opinias, ke la itala lingvo havas ŝancon fariĝi internacia lingvo, sed mi konvinkigis, ke Esperanto havas ĉiun avantaĝon, kiu faris la italan lingvon relative facila al anglaj soldatoj, nome ĝia regula prononcmaniero, sonklareco al la orelo kaj vortsimileco al anglaj radikoj. Mi estas certa, ke la ordinara angla neklerulo kapablas lerni rapide Esperanton. Mia certigilo estas la fakto, ke kiel soldato en Italujo la angla neklerulo tiel rapide lernis la parolelementojn de la simila al Esperanto sed malpli facila itala lingvo.

**Lernejoj en Hungario.** Per dekreto n-ro 40.530/48 VKM el 13. II. 1948 estas de la instruistaro enkondukigitaj en ĝeneralaj lernejoj (infanoj 10—14-jaraj) kiel nedevigaj fakoj latina lingvo, vivantaj lingvoj, Esperanto, muziko, stenoĝrafio. Cent hungaraj parlamentanoj subskribis leteron, adresitan al la ministro de instruado D-ro Gyula Ortutay, dankanta lin pro permeso de Esperanto en la ĝeneralaj lernejoj kaj petanta pri analogia permeso por mezlernejoj. (Heroldo de E., 1. IV. 1948.)

**Vizitu Ĉeĥoslovakion** estas artikolo en „Esperantisto slovaka“ (februaro-marto), enhavanta liston de banlokoj

en Bohemio, Moravi-Silezio, Slovakio. Slovaka Esperanto-instituto en Turĉ. Sv. Martin proponas sin doni informojn pri ĉiuj banlokoj.

**Pasko en Sukcenlando.** Ĝi estas en Latvo-lando, kiel nin instruas latvino, kiu korespondante esperantlingve trovis „heroon de sia koro“ en Ĉeĥoslovakio kaj fariĝis sinjorino Milda Jakubcová. Ŝi rakontas ĉarme en „Esperantisto slovaka“ el marto pri paskokutimoj en Latvio ne povante kaŝi siajn amojn al la naskiĝlando kaj al la edzo samtempe. La geedza paro estu salutita sincere kaj gaje same kiel la samlandanoj de la aŭtorino.

**Kondoli anstataŭ kondolenci** presas Heroldo de E. Kondolenci estas formo fundamenta. Ni ne trovas tiun mallongigon tro rekomendinda, ĉar ĝi tro kripligas la internacian formon: Condoléance france kaj condolence angle. Ambaŭ vortoj estas substantivaj, la esperanta radiko estas verba. Sed ankaŭ la germana verbo de ĝi derivita kondolieren estas same longa, ankaŭ la ĉeĥa kondolovati.

**UNESCO** sciigis per letero de sia filozofia kaj humaneca sekcio al s-ro De Boer, estrarano de Kristana Unuiĝo de nederlandaj esperantistoj, ke la problemoj pri artefaritaj universalaj lingvoj ne estos pritraktata en la proksima estonteco. (Laŭ Heroldo el 1. IV.) Ĝi estas plua pruvo por nia teorio, ke Esperanto ne estos versimile enkondukita per decido de iu publikjura aŭtoritato sed per sia malrapida enpenetrado en la internaciajn kontaktojn neoficialajn. La plej grava tasko nuntempa ŝajnas al ni serĉi sisteme kaj persiste eblecojn por tia neoficiala aplikado. La registaroj ne helpas al ni tro, sed kontraŭ volo de popolo ili ne povos eĉ ne volos kontraŭstari. Sed estas nia tasko pli frue krei tiujn eblecojn de aplikado por Esperanto.

**Boliviano.** Fondiĝis Bolivia Esperanto-Asocio (Asociacion Boliviana de Esperanto), Mayor Carrasco, 346, Piraflores, La Paz. (Bulteno de Reĝa Belga Ligo Esp-ista, marto.)

**Hispanio.** Laŭ sciigo de D-ro Rafael Herrero estis de la hispana registaro permesite restarigi Hispanan Esperanto-Federacion (Valencia, strato Lauria 20, 1). La esperantistoj en lando kun diktatora reĝimo deklaras kiel gravan venkon simplan permeson de kunvenado, kursoj, propagando ktp. Sed samtempe ili estas devigataj atentigi, ke ili ne povas korespondi kun orienteŭropaj landoj kaj kun Germanio kaj Japanio.

**En jarraporto de la propaganda servo de Nederlanda Esperanto-Asocio** en Amsterdam, verkita de H. Bakker, ni legas: La jaro 1947 karakteriĝis per malgranda intereso pri nia movado ĉe la granda publiko. Laŭ mia instigo la direkto de „Olimpisch Stadio“ (Amsterdam) decidis levi la de LEEN donacitajn Esperanto-flagojn okaze de internaciaj sportkonkursoj. Similan rezultaton oni atingis en Rotterdam. La urbestro en Amsterdam rajtigis la policistojn fakon apliki Esperanton por la komunistoj en la taksautomobiloj. Ĉar en Schiphol deĵoras oficisto, kiu scias Esperanton, la direkto aprobis pendigon de nia tabulo „Oni parolas Esperanton“ en tiea doganejo. Samspecan sukceson ni atingis ĉe KNSM (Amsterdam) kaj Bertels Oliefabrieken (Amsterdam)... Al la direkto de Wagons Lits-Cook mi petis prizorgi Esperanto-menuon en la restoraci-vagonoj. Ne venis respondo. Ruteck's (Rotterdam) rifuzis samspecan peton opiniante, ke nur nederlandanoj vizitas ĝiajn restoraciojn... Mi atentigis „American Overseas Airlines“ kaj „Gew. Arbeidsbureau“ (Amsterdam) pri valoro de Esperanto. Kun sama celo mi vizitis la direkcion de NSF (Hilversum)... Rilate al artikolo pri Basic English mi vizitis la redakcion de „Groene Amsterdammer“ kaj sukcesis refuti la argumentojn kontraŭ Esperanto; cetere la redakcio ricevis pri Esperanto multajn leterojn... (Krom aliaj) mi faris propagandan paroladon antaŭ Rotary-Club en Zaandam kaj en Uitgeest; rotarianoj el Zaandam mendis 12 skribajn kursojn. — Ŝajnas al ni tre instrua legado de tiu ĉi raporto de konsciencia propagandanto. Pri tio, kion li akiris, same pri tio, kion li ne akiris. Ankaŭ ni danku lin!

**Faldprospekto pri Svedujo**, lando de la 33-a Universala Kongreso de Esperanto en Malmö 31. VII.—7. VIII. 1948, tre bele presita kun tre bona teksto kaj belega mapo de Svedujo, eldonita de Sveda Turist-Trafika Asocio kaj Kongresa Komitato.

En la plej granda biblioteko de la mondo The Library of Congress (Washington D. C., 5,4 milionoj da volumoj) estas laŭ ĝia raporto citita en American Esperantist n-ro 1—4 1947 sume 273 libroj en Esperanto aŭ pri ĝi. En aliaj gravaj bibliotekoj de la mondo estas la nombro verŝajne ankoraŭ malpli granda. Ekzemple la biblioteko de Harvard-universitato havas sole 5 tiajn publikaĵojn, ĉiujn malnovajn el de antaŭ la unua mondmilito. Ni prenas

## RICEVITAJ LIBROJ

La evangelio laŭ spiritismo, enhavanta la eksplikon de la moralaj maksimumoj de la Kristo, ilian konformecon kun Spiritismo kaj ilian aplikon al diversaj situacioj de la vivo de Allan Kardec, aŭtoro de „Libro de spiritoj“. Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro. El la franca lingvo tradukis Ismael Gomes Braga. Unua eldono en Esperanto finpresita en 3. X. 1947. Brazila spiritisma federacio, Eldona departemento, Avenida Passos, 30, Rio de Janeiro, Brazilo. 432 paĝoj 14×19 cm. Tre bele bindita. — Traduko de la fama ĉefverko pri spiritismo, aperinta en 1864 en Parizo. La 33a eldono, aperinta en Rio de Janeiro en 1947, havis 15.000 ekzemplerojn, la 34-a en julio 1947 denove 15.000 ekzemplerojn. Ĝi estas en Brazilo la plej ŝatata el verkoj de Kardec. La libro redonas instruojn, kiujn donis Spiritoj pri tiuj enhavaĵoj de evangelioj, kiuj apartenas al ilia parto de morala instruado. „Spiritoj“ estas laŭ la aŭtoro efektivaj Spiritoj, skribataj kun granda S por diferencigi de „spirito“, kio signifas laŭ Plena vortaro „tuto de la homaj mensaj kapabloj“. La Spiritoj manifestiĝas per medioj kaj estas pruvo de ilia ekzisto kaj de vereco de iliaj revelacioj fakto, ke oni povas racie kaj logike esplorante revelaciojn de medioj el la plej diversaj klasoj, el la plej diversaj landoj kaj dum la plej diversaj situacioj veni al konkludoj, kiuj racie kaj logike forigas trompojn kaj erarojn kaj venas al koicidantaj asertoj. La fama aŭtoro gloriĝis verŝajne pro la klareco de sia stilo. Oni povus ripeti la aserton pri la franca logikeco. Jen specimeno de lia stilo kaj pensmaniero: „La spiritismaj fenomenoj, kontraŭe de tio, ke ili kreditigis la falsajn profetojn, kiel iuj ordinare diras, donas al tiuj la lastan baton. Ne petu do de Spiritismo miraklojn kaj mirindaĵojn, ĉar ĝi formale deklaras, ke ĝi neniel okazigas ilin. Same kiel la fiziko, la ĥemio, la astronomio, la geologio eltrovis la leĝojn de la materia mondo, Spiritismo evidentiĝas aliajn nekonatajn leĝojn, la leĝojn, kiuj regas la interrilatojn de la korpa kaj spirita mondoj kaj kiuj, same kiel tiuj sciencaj — iliaj pli maljunaj fratinoj — estas ja ankaŭ leĝoj naturaj. Klarigante ian klason de fenomenoj ĝis hodiaŭ ne kompreneblaj, Spiritismo detruas la restaĵojn el la regno de la mirindaĵoj. Kiu estus do tentata ekspluati tiujn fenomenojn por sia profito, ŝajnigante, ke li estas mesio de Dio, tiu ne povus longe trovi la aliulan kredemon kaj estus baldaŭ senmaskigita... Spiritismo malkaŝas alian, multe pli danĝeran, kategorion de falsaj kristoj kaj falsaj profetoj, kiuj troviĝas ne inter la homoj, sed inter la elkarniĝintoj: tiaj estas la Spiritoj trompemaj, hipokritaj, fieraj kaj pseudo-kleraj, kiuj de la tero pasis al la vagoj kaj ornamigis per respektindaj nomoj, penante sub tiu masko, ke estu akceptataj ofte la plej strangaj kaj absurdaj ideoj. Antaŭ ol la permediumaj rilatoj estis konataj, ili agadis en maniero malpli videbla, per inspirado, per senkonsciaj medioj.“ Tiu ĉi teksto el paĝo 307 estas specimeno ne sole de klareco de la aŭtoro stilo, sed ankaŭ de la traduka lingvaĵo. Ĝi meritas nepre grandan laŭdon. La tradukanto redonas klarecon de originalo, li parolas per lingvo simpla kaj tamen tre subtila. Tradukaĵoj el la Biblio estas prenitaj el la Brita eldono. La tuta traduka kaj eldona laboro estas farita, ni diru, tre pure, por akcenti la sindonon de la tradukinto al la temo kaj celo de la libro kaj al la lingvo same. Malofte oni povas trovi libron, kies lingvon oni povus laŭdi tiom sincere kaj kontente. La libro servas al du celoj: Diskonigi doktrinion de Kardec, ĉar multaj legos lian libron en tiu ĉi traduko unuan fojon, kaj denove pruvi lingvajn kvalitojn de Esperanto. Ambaŭ celoj estas atingataj eminente.

tiu ĉi informon el propono de D-ro Paul Neergaard starigi Bibliografian Sekcion ĉe Akademio de Esperanto. La sekcio klopodus starigi listojn de Esperanto-literaturo en la gravaj publikaj bibliotekoj kaj starigi kaj kontroli kompletan kolekton de Esperanto-literaturo en la plej ĉefaj bibliotekoj en la mondo (The Library of Congress Washington, The British Museum Londono, Bibliothèque Nationale Parizo, La ŝtata biblioteko Berlino, Gosudarstvenaja Publiĉnaja Biblioteka Leningrado).

**Who's who among North American Esperantists** — Kiu estas kiu inter Nord-Amerikaj Esperantistoj. Dua eldono 1947-48. „Espero“ Route 5, Little Rock, Arkansas USA. 96 paĝoj 11×15 cm. — Tiu ĉi tre zorge farita adresaro de nord-amerikaj esperantistoj enhavas 377 nomojn el Usono kaj 24 el Kanado. La nomaro estas detala, estas indikoj pri naskiĝo, profesio, esperantistiĝo, ĉefaj laboroj pri E. Malofte oni trovas libreton tiom propagandan en la plej bona senco de la vorto. Jen viroj kaj virinoj, el kiuj ĉiu per si mem signifas personecon: kaj ĉiu el ili estas konvinkita samideano. Vere edifanta faro kunigi tiujn nomojn.

**Jarlibro de Sennacieca Asocio Tutmonda 1948, SAT**, 67, av. Gambetta, Paris, 20. 172 paĝoj, 11×15 cm. — La unua postmilita eldono, la lasta aperis en la jaro 1939. Ĝi enhavas adresojn de ĉiuj SAT-anoj, sume 3.700 adresojn „el preskaŭ ĉiuj partoj de la planedo“. Plej multaj estas verŝajne el Nederlando; iu statistiko pri la landoj tute mankas en la libreto. El Praha estas 10, el Brno 2, el Bratislava 7, el Pizeŝ 27 membroj enskribitaj.

**Martin Benka: Slovaka popolkanto**. Ĝi estas serio de 4 poŝtkartoj laŭ bildoj de tiu ĉi eminenta slovaka artpen-tristo. Sur ĉiu super kaj sub la bildo estas slovaklingva teksto de la unuaj versoj de la kanto. Sur la adresflanko estas esperantlingva traduko (versa) de J. V. Dolinský. La bildoj tre eminentas, la folkloro, pentrata de Benka, sonas per tono tute aparta. La kartojn eldonis Slovaka Esperanto-Instituto en Turĉ. Sv. Martin kaj estas riceveblaj po 11 Kĉs (afrankite ĉiuj 4) ĉe nia librovendejo.

**J. V. Dolinský: Momenta rigardo en la trezorejon de la slovaka popolkanto**. Eldonis Slovaka Esperanto-Instituto en Turĉ. Sv. Martin. 8 paĝoj 15×20 cm, prezo 2,50 Kĉs. — Instrua kaj plaĉa broŝuro, informanta pri slovakaj popolkantoj, pri ĉefaj kolektantoj kaj matrikulantoj de tiu ĉi grava kaj belega materialo folkloro. La teksto enhavas kiel specimenojn tradukojn de 9 kantoj. La broŝuro meritas esti legata de ĉiu, kiun interesas estetikaj valoroj, kreitaj antaŭ jarcentoj kaj en Slovakio ankoraŭ nun kreataj de simpla popolo. Certe legos ĝin kun intereso tre multaj fremduloj.

**Ed. V. Tvarožek: Esperanto v 14 úlohách**, Vydalo Slo-ven. Sdruženie, Bratislava. Stran 28, 19×28 cm. Cena 15 Kĉs. — Ciklostilita lernolibro por slovakoj en 14 lecionoj. Ĝi redonas la materion de gramatiko kaj de vortfarado komplete kaj klare. La ekzercaj tekstoj estas verkitaj en tre bona lingvo. Iliaj frazoj estas ofte originalaj, iliaj temoj estas tre simplaj, kio ne estas riproĉinda sed laŭdinda. Devus enesi pli da tiaj tekstoj. Sed neceso eldoni la lernolibron ciklostilite certe kaŭzis ŝparadon kun tekstoj. Ankaŭ la skriba aranĝo ne povas esti tiom sinoptika, kiom en presita libro. Sed ĉar la maŝin-skribistoj estis relative tre atentema, la lernolibro estas bonege uzebla por studado individua same kiel por studado en kursoj. La plej okcidenta lando de nia Respubliko estas nomata Bohemio, neniam Bohemujo, ĉar temas pri historia nomo por geografie morfologia tutaĵo, ne pri nomo derivata de loĝantoj; tiam ĝi devus esti nomata „Ĉeĥujo“.

**J. C. Heer: Ĉe la Sanktaj akvoj**. Romano el la svislanda montegaro. Unua parto. Trad. A. Bader, P. Le Brun, J. Schmid. Eldonis Svisa Esperanto-Societo, Bern 1947. 84 pĝ. 16×23 cm; Prezo sv. fr. 3.10, ĉe nia Libroservo Kĉs 39.60. — Ne estas ĉefverko, sed agrabla, iam streĉa historio, kiel vivas, amas kaj mortas svisaj montaranoj. Simpla stilo kaj bona lingvo. Nemultaj preseraroj (tendado anst. tentado 36, gradisto anst. gardisto 69), eksteraĵo tre plaĉa. Rekomendinda legaĵo por horoj de ripozo. (O. G.)

**Du amosentaj noveloj.** Imenlago de Theodor Storm. Maruška de Mela Escherich. Trad. Alfred Bader. Eldonis Svisa Esperanto-Societo, Bern 1947. 42 pĝ 16×23 cm. Prezo sv. fr. 2.10, ĉe nia Libroservo 26.80. — Du amaj senpretendaj noveletoj en simpla, ne riproĉebla lingvo. Tamen ciganan knabinon oni nomas tie (11) bohema. (OG)

**Pensoj de Zamenhof.** Tradukitaj el Esperanto, la internacia helplingvo tutmonda. Eld. Svisa Esperanto-Societo, Bern 1945. 32 pĝ. dukolore presitaj 13×20 cm. Prezo sv. fr. 1.10, ĉe nia Libroservo Kĉs 12.80. — Originalaj sentencoj de Zamenhof, tradukitaj en francan, anglan, germanan kaj italan lingvojn. Aldonita La Espero kaj La Vojo. Valora broŝuro laŭ enhavo kaj aranĝo. (O. G.)

**Tago Lindbom: Sveda laborista movado.** El la sveda tradukis Martin Johansson. Eld. Sveda Laborista Esperanto-Asocio, Barnhusgatan 8, Stockholm en julio 1947. 92 pĝ. 12×18 cm. Por 2 respondkup. liveras la eldonejo. — Instrua verko pri la 50-jara historio, agado kaj nuna situacio de la socialdemokrata partio sveda, kiu forte influis la sorton de la lando. La eldonon de la riĉe ilustrita, sur bela papero presita libreto ebligis la Sindrikata centro sveda. Klara, senerara lingvo. (O. G.)

**Lajos Zilahy: Printempo de morto.** Trad. el la hungara Ladislao Somlai-Spierer. Eldonis Eldona Societo Esperanto, Fack 19071, Stockholm 1947. 122 pĝ. 13×20 cm. Prezo broŝ. sv. kr. 6.50, bind. sv. kr. 7.25. Ĉe nia Libroservo Kĉs 100.— kaj 111.—. — Preskaŭ ĉiuj 120 paĝoj prezentas unusolan leteron, kiun skribis la heroo de la romano en hotela ĉambro, estante ekstreme ekscitita kaj antaŭ plej grava decidiĝo. Sed oni malatentas tiun ĉi nekredindaĵon legante tiun historion pri fajra amo de juna viro al du virinoj. Nenio mankas, kio en vera ama romano devas enesti kaj tial la verko trovas ĉe esperantistoj certe saman plaĉon, kian trovis ĝiaj 18 diverslingvaj tradukoj jam aperintaj. La lingvo estas zorga kaj oni apenaŭ trovas gravan kritikindaĵon. Tamen ekz. anstataŭ „binoklo“ (multloke), kiu estas laŭ Plena Vortaro „malgranda dutuba teleskop“, ni uzus la tradician, sed ne malbonan esprimon „okulvitro“, ĉar pri ĝi temas. La eksterajo de la libro estas bela, kiel estas kutimo ĉe svedaj eldonaĵoj. — Ni devas gratuli niajn hungarajn najbarojn, ke ili scias per Esperanto vaste konigi sian literaturon. Ni ĉeĥoj vidas diversajn verkojn hungarajn unufoje en esperanta vesto, pli frue ol en propralingva traduko. (O. G.)

**Ján Valaštan Dolinský: Okienko do sveta.** Uĉebnica mezinárodného jazyka esperanto. Cena 30 Kĉs. Vyšlo ako cudzojazyčná príloha XXV. ročníka časopisu „Krásky Slovenska“ v Turč. Sv. Martine (zodp. zást. Dr. L. Izák). Vydal slovenský esperantský ústav. Stran 64, 15×20 cm. — Nova lernolibro por slovakoj verkita de meritplena kunlaboranto en nia movado. Ĝi estas tre detala, informante pri ĉiuj reguloj kaj pri ĉiuj problemoj de la lingvo. Estas sufiĉaj ekzemploj donataj. Estas eĉ klarigata senco de „ĉevali“ analogie al „reĝi“. Detale estas ekzemple klarigata uzo de prepozicioj kiel prefiksoj tiel, ke ekz. „ĉirkaŭ“ estas traktata kiel prefikso nediferenca de ge- aŭ bo-. La libreto estas litografita el maŝinskribita teksto sur tre bela, mi dirus luksa papero. Rezultis el tiu ĉi fabrikado libreto tre bele presita, kiu certe plaĉos al ĉiuj kandidatoj de esperantismo. Sed ĝia atenta legado donos utilon ankaŭ al progresintaj esperantistoj, ĉar ĝi tuŝas kelkajn efektive fundajn problemojn de la lingvo.

**Josefo Joels: Panoramo de nia movado.** Prelego farita la 5-an de oktobro 1946-a en la Asocio Esperantista de Rio de Janeiro. Kolekto „Nova vojo“. 16 paĝoj 15×11 cm. 3 respondkuponojn ĉe Josefo Joels Caixa 2-Lapa, Rio de Janeiro, Brazilo. — Tre plaĉe litografita broŝureto maŝinskribita. Jen parto de la enhavo: „Ankaŭ mi aspiras ja je paco, sed je paco tute alispeca. Mi aspiras je tiu Paco, kiu kune kun la Libero konsistigas la medion, en kiu oni povas plene vivi, senĝene kreadi, rapide progresadi. Mi aspiras je la vibranta multsonora paco de la vivplenaj metropoloj, kie pulsadas la moderna civilizacio, kantadas la motoroj, malhaltas la rotaciaj presmaŝinoj, floradas la sciencoj kaj artoj, flagradas priidealaj debatoj, kreigas ĉiuhore la Novo kaj modliĝas ĉiutage la pli racia, pli bela Morgaŭo.“ La aŭtoro tre verve pledas por pli moviĝema movado nia.

**Bento de Jesus Caraça: Galileo Galilei.** Scienca kaj morala valoroj de lia verko. El la portugala lingvo tradukis Manuel de Freitas. 1948. Portugala eldona rondo, Monte da Lapa 49-1<sup>o</sup> Porto (Portugalia). 64 pĝ., 13×19 cm. Prezo 25 Kĉs plus 1,50 Kĉs afranko. — Temas pri parolado, okazinta en la Portugala Popol-Universitato en Lisbono la 22-an de junio 1933. Ĝi komencas per tekstoj de la Galileo-akuzo la 22-an de junio 1633 en Minerva-monaĥejo en Romo antaŭ la dek kardinaloj kaj de forkonfeso legita de sepdekjara Galileo sur genuoj. Poste estas skizita tre informe kaj kun malofta sperteco la evoluo de hipotezoj pri formo kaj situo de la Tero, Suno kaj Planedoj de la epoko de Anaksimandro (pensogiganto, el kies cerbo ŝprucis ideoj ĝis nun ne superitaj) en Mileto ĝis la epoko de Galileo. La informoj ĉie estas ĝustaj kaj la stilo de la aŭtoro estas tre klara. Kiel ekzemplojn de tiu klareco ni citu parolojn pri Pitagora ideo de nombro, kiel ĝi estiĝis el punktoj posedantaj ampleksecon kaj konsistigantajn rekonon, aŭ akcenton sur eltrovo de ideo de inercio (setrvaĉnost). Estis por ni ĝuo legi tiun broŝuron. En la libreto estas sinoptika tabelo pri evoluo de fizikaj scioj de orienta scienco en jaroj antaŭ 700 a. K. al la Mileta skolo en limo 600—500 jaroj kaj tra la jarcentoj al la relativeca meĥaniko en la dudeka jarcento post Kristo. Ĝi estas tre instrua, mi malofte vidis tabelon, kium mi estus rigardinta kun tioma intereso pro ĝia simpleco kaj klareco. — La traduko ne estis laboro tre facila. Sed rezultis verko, kies lingvaĵo ne meritas riproĉojn; ĝi estas tre klara, facile komprenebla, la tradukanto meritas sinceran gratulon.

Ni atentigas, ke eksterlandajn eldonaĵojn ni povas liveri sole escepte kaj en limiĝita nombro.

**Esperanto na poštovních cenninách.** Jakožto 4. informační list o esperantu jsme vydali zvláštní otisk našeho rozsáhlého článku o esperantu na poštovních cenninách, otištěného v loňském našem ročníku. Je to dobrý doklad o oficiálním užití našeho jazyka mnoha poštovními správami a je tudíž tento separát, jenž obsahuje četná vyobrazení, dobrou propagační pomůckou, velmi vhodnou k šíření nejen mezi filatelisty. Objednejte v našem knihkupectví po 1 Kĉs za 1 výtisk s připočtením poštovného. — Doporučujeme zároveň odběr i ostatních našich »Informačních listů«: čís. 1. Esperanto - jednotné jazykové pojtko národů, s přípoj. čís. 2. Krátké uvedení do esperanta, za 1 Kĉs. Jakož i 2. číslo nové řady Informačních letáků: »Česká a slovenská literatura v esperantu« za 2 Kĉs.

#### KOMERCISTOJ ATENTU!

Por la jaro 1949 estas denove preparata esperantista poŝkalendaro. Ĉar ni deziras havi kompletan adresaron de ĉiufakaj komercistoj, kiuj uzas Esperanton aŭ kiuj havas en sia entrepreno esperantiston, ni petas baldaŭan alsendon de via adreso. La anonco estas senpaga, nur libervola subteno estos danke akceptata, sed ne estas deviga. Ni havas jam sufiĉe multajn adresojn el eksterlando, do sendu baldaŭ ankaŭ la vian. La poŝkalendaro estos pli ampleksa kaj certe laŭ ĉies plaĉo. Adresu al: Fr. Pytloun, Zamenhofova 1010, Hradec Kr. II.

## SCIIGOJ

**Festa insigno de ĉeĥoslovaka esperantisto** — ĉeĥoslovaka flago kun Esperanto-stelo — eminenta propagandilo kaj ornamo, farita laŭ desegno de Bartošik, estos baldaŭ havebla ĉe Librovendejo de EAĈSR. Prezo 25 Kčs afrankite. Mendu tuj!

**Libro vendejo de EAĈSR informas kun bedaŭro**, ke ĝi provizore ne povas akcepti mendojn por eksterlandaj eldonaĵoj (libroj aŭ gazetoj). Ĝi ankaŭ ne akceptas anoncojn por eksterlandaj gazetoj. Ni sciigos niajn legantojn pri ŝanĝo de tiu situacio.

**Esperanto-Asocio en ĈSR** provizore ne povas akcepti aliĝojn al UEA kaj petas paciencon de la interesuloj. Se ni ne sukcesos transdoni la kotizojn lastatempe alvenintajn, ni informos pri tio la pagintojn.

**El la administracio:** Opakujeme sdělení se strany 35 letošního ročníku: Náklad prvních archů slovníku je rozebrán. Pokud nepostačí ty výtisky, které nám vracejí členové slovníkovou přílohu nepředplatí, dáme archy dotisknout znovu, takže všichni noví členové dostanou slovník celý. Jejich adresy máme v patrnosti a prosíme je o strpení. Jednotlivé urgency v této věci jsou zbytečné a nemůžeme na ně odpovídat.

K jednomu výtisku časopisu nelze přikládat více než jednu přílohu slovníku. Neobjednávejte prozatím další výtisky, budou v dostatečném množství k dostání po vyjití celého slovníku.

Členům náležejí čísla ode dne jejich vstupu do Svazu, podle možnosti jsme jim však dodávali i čísla dřívější. Pro nečekaný vzrůst počtu členstva jsou však tři první čísla letošního ročníku úplně rozebrána. — Nereklamujte tedly!

**Kancelář.** Zřídili jsme v Praze II, Malá Štěpánská 7 (telefon 330-14) svazovou kancelář s úředníkem p. Tomášem Baldou. Otevřeno denně od 14. do 18. hodiny, v sobotu od 8. do 12. hodiny. Dobrovolní pomocníci vždy vítáni.

**Korespondenci** adresujte i dále na adresu: Svaz esperantistů ĈSR, Uralské 9, Praha XIX, — nebo: Svaz esperantistů ĈSR, pošt. schránka 75, Praha XIX/14. Tato adresa je jen pro zásilky, nikoliv po návštěvy.

**Peranto de UEA sděluje:** Členství MA UEA a MJ, hlášené nám zasláním členského příspěvku v únoru a později, nebylo již v Londýně projednáno, neboť nemáme toho času možnost převést placené částky příspěvků do Londýna. Členové, přihlásivší se v této době, nedostávají dosud časopis Esperanto a nedostanou jej, dokud nebudou ukončena jednání, která vedeme ve věci úhrad do ciziny. Do té doby prosíme o strpení. Na jednotlivé reklamace nemůžeme odpovídat.

**El la libroservo:** Ze stejných důvodů jako příspěvky UEA nemůžeme prozatím přijímat objednávky zahraničních knih, jakmile nepatrná zásoba, kterou ještě máme, bude vyčerpána. Další dodávky zahraničních knih závisí taktéž na výsledku jednání o možnosti jejich úhrady do ciziny. — Totéž platí pro objednávky zahraničních časopisů a inserátů v nich.

**Skolta Esperantista Ligo.** Naciaj sekcioj de SEL estas jam restarigitaj en Anglio, Aŭstralio, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, Francio, Hispanio, Italio, Nederlando kaj Svedio. En Anglio kaj Ĉeĥoslovakio kun skoltinaj sekcioj. Ni petas la esperantistaron helpi al ni trovi en ĉiu lando de la mondo SEL-reprezentantojn. En Ĉeĥoslovakio funkcias jam kelkaj lokaj reprezentantoj de SEL.

Ni petas la ĉeĥoslovakajn esperantistojn subteni niajn lokajn reprezentantojn de SEL, helpi al ili aranĝi la kursojn. En venontaj numeroj de „Esperantista“ ni publikigos

la nomojn de la lokaj reprezentantoj de SEL por ke vi povu ekrilati kun ili kaj aranĝi komune propagandon de Esperanto inter la skolta junularo. Ne forgesu atentigi nin je la aranĝoj. Nia adreso estas: Esperanto fako de Junák, Praha II, Havlíčkovy náměstí 28.

Regulaj laborkunvenoj de la membroj de SEL en Praha (de la Esperanto-kortumo) okazas merkrede de la 17-a ĝis la 19-a horo en la ejo de Porfremda fako de Junák, Praha II, Havlíček-placo 28, II-a etaĝo. La unua kunveno okazis la 7-an de aprilo 1948. (SEL reprez. St. Lešinger.)

**Korekto.** En nia Raporto pri agado, sur p. 26, legu, ke E. K. Praha solenis 45 jarojn de sia ekzistado (ne 40!).

**Esperanto-kongreson en Malmö povas partopreni, laŭ sciigo de ministerio por interno, sole du reprezentantoj el nia lando. — La aŭtoĉara karavano do ne okazos.** (Pytloun)

## ESPERANTISTA VIVO

**Mortis Josef Patera**, la 11-an de marto en Plzeň. Okcident-Bohemian Esperantistaron forlasis vigla, diligenta, senlaca samideano, kiu sindone per ĉiuj siaj fortoj servis al nia nobla ideo, ĉefe inter la laboristoj kiel sekretario de la laborista societo „Kulturo“. Li aranĝis multajn kursojn, oni povis lin renkonti ĉie, kie nia movado postulis helpon. Ĉar li estis nur 27-jara, lia morto tre profunde tuŝis la esperantistojn en okcidenta Bohemio. Ĉeestis pli ol 300 gesamideanoj ĉe lia enterigo. Ĉe la tombo en nomo de O. B. E. adiaŭis lin František Kavan, por la societo „Kulturo“ František Kalný kaj por internacia esperantistaro Fr. Dunant el Francujo.

**Geedzoj Alois kaj Marie Strejčkovi**, Mášova 11, Brno, deziras korespondi kun samideanoj el Moravio.

## V ĉervenci — do Doks

je heslem těch, kdož touží spojit krásné s užitečným!

Obrovské Máchovo jezero s plážemi, rozsáhlé lesy, památný Bezděz, lázeňské prostředí, esperantská společnost a »Letní škola esperanta« nabízejí zde tělesné a duševní osvěžení. Ve dnech 17.—31. července t. r. Doksy budou zase esperantské! L. Š. E. pořádá zde — již třetí rok — své odborné prázdninové kursy esperanta a společenské podniky, o nichž podrobné zprávy najdete v předešlých číslech časop. »Esperantista«.

Vyžádejte si propagační prospekt s přihláškou u jednatele »Školy« p. K. Šolce, Mladá Boleslav I, 41 a přihlaste se s urychlením, neboť počet účastníků je omezen! Dobré uspořádání minulých kursů po stránce učebné i zábavné bylo žactvem s uspokojením přijato a je nejlepším doporučením k účasti i na prázdnin. kursech letošních.

Komité LŠE vypisuje tímto soutěž na esperantskou (neb českou) povídku asi o 400 až 500 slovech, jejíž děj se odehrává v Doksech a LŠE, po př. tam začal neb skončil. Práce třeba předložit do 17. VII. 1948. Nejlepší 3 budou odměněny a uveřejněny ve V. V. D. — Na shledanou v Doksech!

Komité LŠED.